Somera mondo

Vortoj kaj muziko de
Ĵomart Amzeev

De tagoj strikta vico
instruas nin atendi.
Nur unufoje licas
someron mendi.

Nur foje jaro povas
por mi donaci feston
kaj mara vento blovas
en fenestron.

Rf- I : Kutime estas ĉio
kaj kuras mi laû rondo.
Sed en memoro mia
Sed en memoro mia
Sed en memoro vivas
Somera mondo.

Okazas nepre l'festo,
mi vin ekvidos ĝuste.
Malmultaj tagoj restas
ĝis aûgusto.

Rf- I :